

# STARTO

**N-ro 2/2023 (287)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



**Renkontiĝo en Ŝumperk**

**Sabato, la 20-an de majo 2023**

**Antaŭ la fajrobrigadista stacio Ŝumperk**

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** [cea@esperanto.cz](mailto:cea@esperanto.cz), [ces@esperanto.cz](mailto:ces@esperanto.cz).

**Retpaĝaro de ĈEA:** [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz)  
[redakce@esperanto.cz](mailto:redakce@esperanto.cz)

**Identec-numero (IĈ):** 00 44 30 34

**Starto retroŝte:** [starto@esperanto.cz](mailto:starto@esperanto.cz)

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 1160 Kč, 700 Kč (rete), 400 Kč (rete por ĈEA-anoj); Marĉek: 1360 Kč, 900 Kč (rete), 600 Kč (rete por ĈEA-anoj), Cink por progresintoj 1920 Kč, 1000 Kč (rete), 700 Kč rete por ĈEA-anoj). Aliĝoj: [kurzy@esperanto.cz](mailto:kurzy@esperanto.cz)

**Libroservo:** Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz), [marie.cumova@seznam.cz](mailto:marie.cumova@seznam.cz).

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** [muzeagrupo@esperanto.cz](mailto:muzeagrupo@esperanto.cz)

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:**  
sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al:  
[muzeo@esperanto.cz](mailto:muzeo@esperanto.cz)

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

2800 186 228/2010

**Fio banka Svitavy**

## Výbor ĈES:

**Předseda:** Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, [tomecek@esperanto.cz](mailto:tomecek@esperanto.cz); (koordinace a reprezentace ĈES, muzeum Svitavy)

**Místopředseda:** Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, [libusehyblova@seznam.cz](mailto:libusehyblova@seznam.cz) (vnější vztahy, UEA, EEU)

**Pokladník:** Mgr. Andrea Švubová, [svubova@esperanto.cz](mailto:svubova@esperanto.cz) (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ĈES)

**Člen výboru:** Leonarda Chaloupková, [leonarda.chaloupkova@esperanto.cz](mailto:leonarda.chaloupkova@esperanto.cz) (kluby a sekce, konference, granty)

**Člen výboru:** Josef Kalčík, [kalcik@esperanto.cz](mailto:kalcik@esperanto.cz) (spolupráce s mládeží, web)

**Redaktor Starta:** Miroslav Malovec, [miroslav.malovec@esperanto.cz](mailto:miroslav.malovec@esperanto.cz) (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika) fakaj aplikoj, pedagogio)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:**

Petr Chrdle, Anglická 878,  
252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201,  
[chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

**UEA-kotizperanto:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Admi-  
stras: Petr Chrdle.

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy,  
[muzeo@esperanto.cz](mailto:muzeo@esperanto.cz)  
[www.muzeum.esperanto.cz](http://www.muzeum.esperanto.cz)

**Facebook kaj Ipernity**

[www.facebook.com/Esperanto.cz/](http://www.facebook.com/Esperanto.cz/)

[www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy](http://www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy)

[www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/](http://www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/)

[www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/](http://www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/)

**Kontrollegis:** la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

# Konference Českého esperantského svazu

Vážení přátelé,

žijeme v turbulentní době, kdy se podmínky neustále mění.

Na loňském sjezdu v Pardubicích jsme jako výbor slíbili uspořádat konferenci v roce 2023 v atraktivním prostředí vinařského kraje v některé z lokalit Strážnice, Mikulov nebo Valtice. Ekonomická situace a nejisté výhledy ale brání provozovatelům škol a studentských domovů přijímat objednávky a garantovat ceny více než půl roku dopředu. A komerční objekty typu penzionů, kterých je v tomto regionu sice dostatek, obvykle nedisponují potřebnou kapacitou ubytování a ani společenskými prostory.

Proto jsme využili možnost uspořádat konferenci Svazu v rekreačním zařízení ve vesnici Prudká, která leží 40 km severně od Brna. Na podzim loňského roku se na stejném místě uskutečnila Konference Českého železničářského esperantského svazu ke spokojenosti účastníků i organizátorů.

Rekreační středisko Prudká se nachází v přírodním parku Svratecká hornatina, v dolní části je lemováno řekou Svratkou, okolí tvoří malebná zalesněná krajina, která láká ke krátkým i delším procházkám kolem meandrů. V bezprostřední blízkosti se nachází technický unikát – krytý dřevěný most z konce 19. století.

Ubytování je ve dvou samostatných budovách v pokojích po dvou nebo po třech. Většina pokojů je vybavena vlastním sociálním zařízením. Pro účastníky s omezenou pohyblivostí můžeme zajistit ubytování v přízemí. Jídelna a

společenské místnosti pro konferenci se nacházejí ve stejné budově jako pokoje. V případě enormního zájmu můžeme využít i ubytování v chatkách.

V tomto období budeme pravděpodobně v celém areálu jediná hosté a v tomto počtu kuchyň není schopná zajistit vegetariánskou stravu. Je zde ale možnost pro zájemce zajistit bezlepkovou stravu s výjimkou pečiva.

Vlastní jednání členské schůze proběhne v sobotu a v neděli, ale všichni účastníci konference jsou vítáni už od čtvrtka, kdy se v České republice slaví Den české státnosti a je volný pracovní den. Pro všechny, kteří přijedou už ve čtvrtek je připraven zábavný večer, zpěv a povídání o Světovém kongresu esperantistů v Turíně. V pátek mohou účastníci navštívit Zahradní železnici v Drásově. O turistický zážitek ale nebudou ošizeni ani účastníci, kteří přijedou až v pátek odpoledne či večer. V sobotu po pracovním jednání plánujeme výlet vlakem na hrad Pernštejn. Hrad je národní kulturní památkou a za posledních padesát let se v jeho prostorách točilo více než třicet filmů.

Členská schůze začíná oficiálně v sobotu 30.9. v 9.00.



Ilustrační foto z podzimní konference železničářů-esperantistů v Prudké

# POZVÁNKA NA ČLENSKOU SCHŮZI Českého esperantského svazu, z.s.

kteřá se koná ve společenské místnosti  
Rekreačního střediska Prudká  
v sobotu dne 30.9.2023 od 9 hodin.

## PROGRAM:

zahájení, volba orgánů konference  
zpráva o hospodaření ČES  
zpráva o činnosti ČES a jejích organi-  
začních složek  
diskuze ke zprávám o hospodaření a  
činnosti ČES  
pracovní skupiny  
usnesení

V pracovních skupinách na jednání  
chceme probrat například možnosti  
pořádání Universala kongreso v České  
republice v Brně v roce 2026 nebo jak  
oživit esperantské hnutí v ČR.

Nebude chybět kurz esperanta,  
společné zpívání a tradiční společenský  
večer s hudbou a tancem...

Rekreační zařízení se nachází v bez-  
prostřední blízkosti železniční zastávky  
na trati 251 Brno – Tišnov- Nové Město  
na Moravě. Cesta vlakem z Brna je cca 1  
hodina, z Prahy cca 3 hodiny.

Nástup do areálu je od 16 hodin ve  
čtvrtek.

Neváhejte a přijed'te, nenechte si ujít  
setkání s vašimi esperantskými přáteli  
v krásné přírodě!!!

Přihlášku můžete vyplnit online na  
našem webu nebo si zavolejte o tištěnou  
verzi přihlášky na telefon 602611584.

*Jiří Tomeček, předseda ČES, z.s.*



Jídelna



Společenská místnost

# Esperanto-Muzeo en Svitavy

## Marcipana Pasko

La 1-an de aprilo 2023 okazis en Esperanto-muzeo Marcipana Pasko por infanoj. La modladon el marcipano jam 15 jarojn gvidas Anna Vyšínková el Vracov laŭ invito de la loka esperantista klubo. Venis 47 infanoj, kiuj kreis kokidojn, anasidojn, kokcinojn kaj leporidojn laŭ propra elekto.



La muzeo kaj klubo engaĝas sin ankaŭ en projektoj subtenantaj te-kulturon.



## „Kunveno en Esperanto-Muzeo Svitavy“

kun inaŭguro de nova ekspozicio  
„90 jaroj de Esperanto en Svitavy“  
kaj „15 jaroj de Esperanto-Muzeo“

de la 8-a ĝis la 10-a de septembro 2023

### Vendredo:

18:00 – vespermanĝo

19:00 – „Reĝo Lávra“ – ensemblo DOMA

20:00 - Prelego pri la vojo per ŝipo ĉirkaŭ Norvegio de Jakub Heřmanský

### Sabato:

9:00 - Inaŭguro de la nova ekspozicio

10:00 - Prelego pri historio de Esperanto en Svitavy de Libuše Dvořáková

10:30 – prezentado de novaj libroj de Petr Chrdle

11:00 - prezentado de novaj libroj de Jindřiška Drahotová

12:00 – tagmanĝo

13:30 – Prelego: "Komenio kaj Zamenhof" de Petr Chrdle

15:00 – Prelego: Historio de Esperanto en Slovakio“ de Mária Pilková

16:30 - prezentado de nova webbo de „Esperanto-Muzeo“ de J.Kalčík, J.Tomeček

18:00 – vespermanĝo

19:00 – koncerto de sinjorino Altiorová

### Dimanĉo:

9:00 – programo de sinjoro Altior

Tranoktadon en Studenta hejmo – 350,-  
Kč/1 persono /1nokto vi devas pagi al la  
konto : **2200199009/2010** kaj aliĝi al  
[dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz)

ĝis la 15-a de aŭgusto 2023

## Trejnado pri Vikifontaro

Ekde la 22a ĝis la 23a aprilo 2023 en la sidejo de E@I en Nová Dubnica okazis **Trejnado pri Vikifontaro (ViPE)**.

**Vikifontaro**, unu el la Vikimediaj projektoj, kolektas kompletajn tekstojn de aliaj fontoj (libroj, gazetoj, leteroj, paroloj, ks). Ĝi servas kiel vikia biblioteko.

La Wikipedia trejnado okazis kiel **parto de la projekto "Vikio por Eŭropo" (ViPE)**, finance subtenita de la programo Erasmus+ de la Eŭropa komisiono. Danke al tio ĝi estis senpaga. Al la trejnado estis invitataj partoprenantoj de partneraj organizoj, kaj ĝenerala publiko.

La trejnado en Nová Dubnica estis la tria el la serio. Dum la **antaŭaj**, kiuj okazis en Pollando kaj Francio, ĉiam dum du tagoj, oni lernis krei sian konton en Vikipedio aŭ ties frata projekto, redakti artikolojn per fonta kodo aŭ vida redaktilo, enmetadi ŝablonojn, kopi-rajton, alŝutadi plurmediaĵojn.

**Celo de la trejnado en Nová Dubnica** estis lerni, kiel sencohave kontribui al Vikifontaro kaj tiel konservi malnovajn (foje eĉ novajn) kulturajn valoraĵojn. Post la trejnado oni jam sciu, kiel krei novajn paĝojn per simpla kopiado de alia fonto, aŭ transskribado de skanaĵo (eĉ kun helpo de OSR – optika signo-rekono).

La unuaj partoprenantoj venis al Nová Dubnica jam vendredon vespere kaj ili havis eblecon viziti la urbeton, la oficejon kaj la arkivon.

Sabaton kaj dimanĉon **antaŭtagmeze** okazis la trejnado mem, **posttagmeze** eblis ekskursi al la proksima banloko Trenčianske Teplice respektive al la urbo Trenčín.

La trejnadon malfermis **Michal Hro-**

**moslav Matúšov** (KuboF) nome de ViPE kaj alproksimigis al la aŭskultantaro la projekton ViPE - Vikio por Eŭropo. Ĝi kreas altedukitan socion, altigas teĥnikajn kapablojn, socie engaĝigas siajn uzantojn, kontribuas al demokratio kaj paco. Esperatlingvaj Vikioj servas por ĝenerala edukado en Esperanto, informado pri Esperanto, firmigo de lingva uzado, bonega prezento ekster Esperantujo. Oni plu edukiĝas, praktikas la lingvon, akiras teĥnikajn kaj sociajn kapablojn, trovas novan hobion.

**Václav Zouzalík** prelegis pri la Vikifontaro. Li menciis ankaŭ la projekton GUTENBERG, kiu en elektronika formo enhavas liberajn librojn kaj tekstojn. Ĉefaj kriterioj por tekstoj estas menciitaj fonton, publikigi ilin kaj havi permeson por tio. La fonto devas esti ĉiam indikita, ĉu enreta aŭ eksterreta. La tekstoj devas esti publikigitaj aŭ eldonitaj kaj trairi redaktan kontrolon. Ili ne rajtas esti memeldonitaj. Permeso devas klare menciigi, ĉu ĉio estas aŭtomate protektita, aŭ estas publika havaĵo, aŭ temas pri neprotektitaj verkoj.

Post tiu informplena, sed por mi, komputila malspertulo, tre sekeca parto, sekvis **apliko** de la aŭditaĵo **en praktikon**.

Sabaton ni lernis enigi en Vikifontaron **tekstojn de Gazetaraj Komunikoj de UEA**, kaj lernis kiel aspektigi ilin (ekz. dikigi, kursivigi la literojn). Ĉiu el la partoprenantoj ricevis sian parton el la eldonitaĵoj de la jaro 2022, kiujn li klopodis plenumi. Dimanĉon ni lernis transskribadi la skanaĵojn surbaze de la verko de Cezaro Rossetti **Kredu min, Sinjorino!** eldonita en la jaro 1950.

Denove ĉiu ricevis po dek paĝoj, kiujn devis klopodi prilabori. La jam enigita skananta bildon ni osr-igis kaj poste ankoraŭ postkuris preterviditajn malglataĵojn kaj korektis ilin. Eĉ nia preleginto Václav devis rapide elpensi programeton por instrui al ni bele korekti la tekston kun interspacoj inter unuopaj literoj...

Mi pensas, ke neniu el la dekkvino de junaj – kaj tri ne tiom junaj – partoprenintoj el diversaj landoj (Belgio, Francio, Pollando, ...) bedaŭris sian alvenon al tiu ĉi interesa trejnado. Sed eĉ tiuj, kiuj ne povis partopreni persone la trejnadon, tion ne bedaŭru. Al ĉiuj la organizantoj ebligis jam ĉi-jare aliron al la unuaj versioj de la videa kurso kaj manlibro, kiuj estis kreataj ene de la projekto.



Magdaléna FEIFIČOVÁ (Fejfi)

2023-05-25

## Artefarita Inteljekto

verkis alian artikolon pri la sama temo laŭ postulo de Václav Zouzalík:

### Trejnado pri Vikifontaro sukcese reskribis faman libron

La trejnado pri Vikifontaro, kiu okazis dum la antaŭlasta semajnfino de aprilo en Nova Dubnica, Slovakio, estis sukcesa. Organizoj E@I kaj Esperanto kaj Libera Scio (ELiSo) kadre de sia projekto Vikifontaro por Eŭropo (ViPE) kun subteno de Erasmus+ aranĝis trejnadon, kies gvidanto estis la esperantisto kaj komputilisto Václav ZOUZALIK el Ĉeĥio. Homoj el diversaj landoj en la oficejo de la organizo E@I lernis pri kiel uzi kaj aktive kontribui al la projekto Vikifontaro, libera reta biblioteko parenca al la pli konata Vikipedio.

Dum la unua tago, la partoprenintoj

lernis pri la projekto kaj kiel enigi tekstojn en ĝin uzante Gazetarajn Komunikojn de UEA. Dum la dua tago, la partoprenintoj sukcesis transkribi la libron Kredu min, Sinjorino! de Cezaro Rossetti kaj finis la transkribon dank' al la senlaca laboro de Fejfi, kiu decidis finpretigi la transkribon de la libro anstataŭ la vespera ekskurso.

La partoprenintoj ne nur lernis kaj laboris, sed ankaŭ havis la ŝancon viziti la pretigitan arkivon de E@I kaj ankaŭ ili vizitis la najbarajn urbojn Trenčianske Teplice kaj Trenčín. Por afable interkonatiĝi, ankaŭ okazis trinkomanĝa nokto ene de la domo de E@I.

Tiu ĉi artikolo estis verkita de ChatGPT, tamen redaktita de Vaclav ZOUZALIK.

Ĝis la amplekso permesita de la leĝaro, Vaclav ZOUZALIK rezignas pri ĉiuj siaj eblaj aŭtoraj kaj rilataj rajtoj al la artikolo “Trejnado pri Vikifontaro sukcese reskribis faman libron” laŭ la kondiĉoj de la permesilo CC0 1.0 Universala

<https://creativecommons.org/publicdomain/zero/1.0/deed.eo>



Unu paĝo el la prilaborata libro. Dekstre oni vidas skanaĵon de la originala libro, maldekstre transkribon de la teksto, kiun la transkribanto devas kontroli kaj forigi mistajpojn.

## Centjariĝo de Esperanto en Přerov

Pri la Esperanto-klubo en Přerov ne ofte aperas informoj, tamen ĝi funkcias, kvankam ne tiel aktive, kiel en la jaroj antaŭ la kovim-pandemio. Dum ĝi ĝis nun porĉiame forlasis nin kvar geklubanoj kaj kelkaj pro la aĝproblemoj ne plu povas ĉeestadi la klubajn renkontiĝojn. Kaŭze de tiu ĉi malĝojiga realeco la klubaj renkontiĝoj okazas en privata loĝejo de la kluba sekretariino s-ino Květa Černá en Přerov.

La nuna jaro 2023 estas speciale grava por Esperanto en Přerov, ĉar antaŭ cent jaroj, en januaro 1923, estis oficiale fondita tiea rondeto de la esperantistoj. Nunjare do nia E-klubo festas gravan jubileon – cent jarojn de Esperanto en Přerov. Do Esperanto escepte de la militaj jaroj 1938-1945 plu en Přerov ekzistas ĝis nun. Frunte de la E-movado en Přerov aktivis eminentaj personoj kiel Adolf Malík, Anna Grauberová, Josef Krumpholtz, Theodor Čejka kaj multaj pliaj, kiuj kapablis alkonduki Esperanton en Přerov ĝis la nunjara ĝia grava jubileo – la centjariĝo.

La soleno de tiu ĉi grava datreveno ne okazos pompmaniere, tamen ni esperas tiucele renkontiĝi, laŭeble ĉiuj geklubanoj, eĉ se nur en privata loĝejo de la s-anino Květa.

Kiel esperantistoj ni esperas, ke la E-ideo plu ekzistos en Přerov ankaŭ dum multaj estontaj jaroj. Ni, esperantistoj, do ne ĉesu plu esperi.

Al la esperantistoj en aliaj lokoj de nia lando ni elkore deziras, ke ilia klubo aŭ rondeto en estonto ankaŭ atingu tiun ĉi gravan datrevenon – la centjariĝon, se ili ĝis nun ankoraŭ ne transpaŝis tiun ĉi gra-

van historian punkton.

Nome de la geklubanoj en Přerov vin ĉiujn salutas, dezirante al vi la forton plu antaŭen porti la E-standardon

*Miloslav Šváček*

## Ovofritaĵo en Vítkovice

La Esperanto-klubo en Ostrava-Vítkovice la 26-an de majo 2023 okazigis la jam tradicion ovofritaĵon, por kiu kolektiĝis 16 esperantistoj.



Ĉe manĝado de pano kun frititaj ovoĵoj ili agrable pasigis la tempon en samideana etoso.





## „NOKTO DE MUZEOJ“ kun Esperanto EN MUZEO de la urbo Čáslav

ČÁSLAV, kiel bela, malnovaĝa urbo! Ĝi estis fondita en la jaro 1264 dum regado de reĝo Otakaro la Dua. Feliĉe la urbo neniam estis konkerita: la urbanoj laŭdire interkompreniĝis kun la atakantoj kaj tiam la urbo saviĝis... Ĉi tiujn kaj ankoraŭ aliajn interesajn informojn pri la urbo donis ĉiĉerono de la Urba Muzeo en ĉambro kun modelo de historia urbo. La modelo montras la urbon de komenco de 17-a jarcento.



En la Urba muzeo oni povas vidi jam menciitan modelon de la mezepoka urbo, „ĉambro de meblaro“, subteretaĝon, iaman kelon, kun la plej malnovaj elfosaĵoj de ĉirkaŭaĵo de la urbo. Sur ekstera korteto troviĝas floroj kaj ankaŭ sablo por infanaj ludoj.

La muzeo aspektas amikece kaj amikeca al ni, esperantistoj, ĝi vere estas. La direktorino invitis nian reprezentanton kadre de „Muzea nokto“ por konatigi vizitantojn kun Esperanto.

La direktorino povis inviti aliajn prelegantojn. Tiuj povus paroli pri multaj sukcesaj samurbanoj – estas jam forpas-

intaj: mondfama reĝisoro Miloš Forman, verkistoj Jiří Mahen kaj Rudolf Těsnohlídek, generalo de la dua mondmilito František Moravec, muzikologo Karel Teige, ... vivanta aktoro Jan Vlasák.

Sed - la 19-an de majo, en la bela „ĉambro de meblaro“ prelegis Petr Čhrdle pri fama samurbanino de Čáslav, poetino kaj verkistino, signifa esperantistino ELI URBANOVÁ.

Krom rakontado pri ŝia vivo, verko kaj agado en internaciaj esperanto-organizaĵoj, pri ŝia signifo por ni, ĉeĥaj esperantistoj, li donis informojn pri Esperanto, antaŭ ĉio pri ĝia gramatiko.

La vizitantoj povis foliumi kaj aĉeti (ĉeĥajn) librojn de eldonejo KAVAPECH kaj ekkoni ankaŭ kelkajn librojn esperantajn, konkrete lernolibrojn kaj vortarojn.



Por ĉeestantaj infanoj la direktorino preparis ludeton PEXESO kun bildetoj de bestoj kaj iliaj nomoj. La infanoj kun siaj gepatroj povis trairi la tutan muzeon, plenumi diversajn taskojn kaj poste gajni iun rekompencan, do la nokto en muzeo estis aranĝo kaj por plenkreskuloj kaj por infanoj.

Fine de la Esperanto-prezentaĵo, kiam finiĝis ankaŭ la tuta aranĝo, la direktorino kaj ŝiaj kunlaborantoj kore adiaŭis kun Petr kaj ĉeestantaj esperantistoj. Ŝajne la lingvo Esperanto estas por la Urba Muzeo interesa temo.

*LCha*

# La Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres" 25.2.2023 - 4.3.2023

MES estas printempa unusemajna renkontiĝo de esperantistoj en suda Francio en agrabla loko ĉe la Mediteranea maro. Tie ni loĝis en bela hotela restadejo *Val d'Esguière*, antaŭe palaco en la tridekaj jaroj, kaj nun nomata "*Village Club Miléade*". Hotelo kaj la parko estas bone prizorgataj, la personaro estas agrabla. Ĝi estis renovigita, aldoniĝis kelkaj novaj instalaĵoj, ekstera naĝejo, tenisejoj, "Spa"-centro por homa bonfarto (natura kosmetiko, masaĝoj, magnetismo, banoj).



Ĉi-foje kolektiĝis 90 partoprenantoj el naŭ landoj por kune ĝui kursojn, diversajn prelegojn, posttagmezajn promenojn, ekskursajn vojaĝojn, vesperajn distraĵojn. Inter ni estis ukraina familio; patrino kun du ĉarmaj geinfanoj, rifuĝintoj gastantaj ĉe franca familio loĝanta en Parizo.

Ĉe la alveno, la nova hotelestro bonvenigis nin en la franca lingvo kaj bondeziris al ni agrablan restadon. Li ankaŭ prezentis al ni la ĉefprizorganton de la kuirejo kaj animantinon de la hotelaj aktivajoj. Andreo Grossmann brile tradukis lian paroladon. Poste ni

tostis per aperitivo, interkonatiĝis kun novaj partoprenantoj kaj gaje dancis farandolon. Ĝi estas provenca ritma viveca ĉendanco, dum kiu la dancantoj manenmane serpentumas inter la publiko. Mi transdonis salutojn al la partoprenantoj de Rosa Lopéz kaj Sol kun Francesco, kiuj ne povis ĉeesti la aranĝon. Christine prezentis la semajnan programon kaj la tri instruistinoj nelonge parolis pri instru-metodoj en siaj respektivaj kursoj.



Dum la tuta semajno okazis instruado de Esperanto en tri kursniveloj: la 1-a por komencantaj parolantoj estis gvidata de Zsófia Kóródy, la 2-a por progresantoj gvidata de Mireille Grosjean, la 3-a pri literaturo gvidata de Spomenka Štimec. Dimanĉon la 26-an de februaro okazis kunveno de la ĝenerala asembleo de Esperanto-Provence. Antaŭ la posttagmezaj kursoj, Svitlana el Ukrainio rakontis pri sia lando, konigis nin pri la historio, kulturo, folkloro, lingvo kaj pri aktualaj okazaĵoj en la nuntempe okupata lando.



Dimanĉe antaŭ la tagmanĝo ni fotiĝis por la ĵurnalo *Var-Matin*, en kiu poste estis aperigita artikolo pri nia staĝo, akompanata per la komuna foto. Post la tagmanĝoj estis libera tempo por promenado en la naturo aŭ por partopreni posttagmezajn ekskursojn al vizitindaj lokoj. Estis proponataj vizitoj al *San Peire*, lagetoj de *Villepey*, klostro en *Fréjus*, muzeo en *Saint-Raphaël*. Interesaj estis la vizitoj de abelejo en *Esterel*, de la muzeo de la fera Masko kaj de Reĝa Fortikaĵo en la insulo *St. Marguerite*. Ankaŭ la hotelo proponis aktivaĵojn en kiuj ni povis partopreni. Iuj preferis kartludi, triki, prilabori broĉojn aŭ tutsimple babili. Carmen, per sia nekutima brodita vestaĵo, propagandis Esperanton per simplaj frazoj. Dum la kafo-paŭzo eblis salteti super la longa turniĝanta ŝnuro aŭ rigardi foto-albumojn pri pasintaj renkontiĝoj.

Vespere, kiel kutime, okazis diversaj prelegoj. La unuan vesperon Mireille Grosjean prezentis diversajn stilojn de arkitektoj. "Arto, lingvo - ĉu paraleloj eblas?" En la lunda vespero ni spektis filmon pri abeloj kaj Philippe Chavignon rakontis pri bredado de abeloj pri kio li estas fakulo. La postan tagon ni vizitis liajn abelujojn en la naturo kaj povis aĉeti mielon. Sekvantan vesperon Spomenka Ŝtimec parolis pri la ĉeĥa jud-devena kaj denaska esperantista knabo Petr Ginz, kiu famiĝis pri sia desegnaĵo de "La Tero vidata de sur la Luno", kiu aperis ankaŭ sur ĉeĥa poŝtmarko. Merkrede, post la vizito al Margarita insulo, kiun la organizantoj donacis al ni senpage, Hannes Larsson prezentis sian libron pri dulingva (angla kaj franca) krimromano en kiu Esperanto ludas rolon por propagandi ĝin al la publiko.

Ĵaŭde vespere Mireille kaj Spomenka parolis pri Hektor Hodler kaj pri lia patro, fama pentristo.

Dum la lasta vespero okazis loterio en kiu ĉiu gajnis ion. La vespero estis dediĉita al prezentadoj de diversaj kantoj, skeĉoj kiujn la partoprenantoj mem pretigis. Aperis plurlingva sceno de vulpo kaj korvo, tri friponoj, fiŝvendisto, problemo kun lavmaŝino ktp. La plej amuza estis sceno pri ebrulo inspirata de la poemo de William Auld "Ebrio". Ĉe la fino prezentiĝis la ĥoruso de Bernard Bigonnet. Sekvis dankoj al la organizantoj kaj al la instruistoj. Muziko de saksofonoj kaj akordionoj dancigis la partoprenantojn ĝis la noktomezo.

Sabate matene jam pluraj samideanoj adiaŭis nin kaj revenis al siaj hejmoj. Tamen daŭris la kurso de Spomenka, kaj en la apuda salono Nina el Rusio prezentis al ni rusajn pentristojn: Vassily Kandinsky, Kasimir Maleviĉ, Marc Chagall kaj Konstantin Vasiljev.

Jam la 15-an fojon la Esperanto-grupo de St. Rafael kaj Fréjus sub la gvido de Monique Prezioso kaj de Christine Graissaguel kun pliaj helpantoj organizis MES, laŭdire la lastan. Tamen estas espero, ke novaj organizantoj transprenos la taskon por daŭrigi la printempan tradicion de tiuj agrablaj semajnoj.

Dankon al ĉiuj kontribuintoj en la aranĝo, pri kiu ĉiuj estis kontentaj kaj strebis al la progreso de sia lingvonivelo. Ni ricevis multajn valorajn informojn pri Esperanto-kulturo. Speciala danko ricevu la tuta familio de Monique Prezioso, kiu multe helpis en la organizado kaj dum la aranĝo mem.

*Liba Gabalda*

# La 39-a Printempa Semajno Internacia

3 - 10. aprilo 2023

Post trijara paŭzo povis denove okazi ĉeesta aranĝo PSI en bela Luter-urbo *Wittenberg*, kiu situas en la germana federacia lando Saksio-Anhaltio apud la rivero Elbo. La partoprenantoj loĝis en komforta junulara gastejo proksima al la historia centro de la urbo Vitenbergo. Al la aranĝo aliĝis 113 geesperantistoj el kvin landoj. PSI okazas en la semajno, kiam oni festas Paskon. Partoprenas ĝin multaj familioj kun infanoj, por kiuj estas ĝojige en la dimanĉa pasko-festo serĉi ĉokoladajn ovojn kaj aliajn dolĉaĵojn. Ili ankaŭ havas programon por sin amuzi kaj lerni Esperanton, dum la plenpreskuloj povas sekvi diversajn prelegojn, diskuti pri diversaj temoj. En la programo estis proponitaj diversaj ludoj, joko, ĉigongo, ĵonglado, origami, ŝtof-kolorigado, ĉina ŝako, konstruado de paperturoj, akrobataĵoj, malstreĉa gimnastiko, zumbao. Eblas lerni Esperanton kun spertaj instruistoj, aĉeti esperantaĵojn en libroservo. La etuloj ŝatas desegni, kolorigi ne nur ovojn, rigardi Mazi-filmon, kunaktori kaj tiamaniere ili lernas Esperanton.



Alloga estis ekspozicio de portretoj kaj libroj de Helga Plötner. Ŝi estas pasia kaj talenta por portreti famajn esperantistojn. La kvin libroj, ĉiu po 16 bildoj kaj inte-

resaj rakontoj, estis eldonitaj pere de la eldonejo Horiozonto de Jasuo Hori en Japanio. Ŝi donis instrukciojn kiel portreti kaj mem liveris necesan materialon.



Dum diversaj prelegoj ni povis ekscii pri *Bauhaus*-arkitekturo kaj poste spekti ĝin propraokule dum la tuttaga ekskurso. Dum alia prelego pri biciklado kun BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia), ni eksciis pri organizaj karavanoj, biciklistaj semajnoj aŭ unutagaj ekskursoj. Aldone ni estis informitaj pri "VeloRElo" - la projekto pri bicikloj en trajnoj. Ĉi-riate Esperanto bone taŭgas por internacia kunlaboro.

Pri sia sperto dum la trajnvojaĝado al la 107-a UK en Montrealo rakontis André Weber. La prelego pri "Lingva terapio de la lernantoj kun milda intelekta neplenkapablo" informis pri "Centro pri plurlingvismo kaj interkultura komunikado PLURIKO". En alia prelego oni komparis la anglan kaj la Esperantan lingvojn. En ĉi tiu vintra sezono estis bone paroli pri imuneco, vitaminoj, nutrado kaj uzo de sovaĝaj plantoj kiel nutraĵo. Dum tiuj prelegoj ni estis informitaj pri multaj interesaĵoj. Ankaŭ la klimata krizo kaj la rolo de Esperanto en tiu sfero estis la temo de ĉi-semajna renkontiĝo.



Dum la semajno okazis multaj enurbaj kaj eksterurbaj ekskursoj. La interesatoj povis elekti inter vizitoj de diversaj muzeoj en la urbo mem, grimpi kastelan turon, uzi turisman trajneton, viziti domon *Luterhaus*, bierfarejon aŭ keksfabrikon kaj ankaŭ sperti noktan prome- non tra Vitenbergo.



Tre interesa kaj ŝatata por infanoj estis la bestoĝardeno en la proksimo de nia loĝloko. Ĝi estas la plej malgranda zoologia parko en Germanio, sed tamen havas grandan diversecon de malgrandaj bestoj, ekzemple mamuloj, birdoj, fiŝoj, serpentoj ktp. Eksterurbe eblis viziti la parkon de *Wörlitz*, kiu apartenas al la mondaj heredaĵoj de UNESCO, Ferropolison, kiu iam estis brunkarba

minejo, muzeon pri la film-industrio *Wolfen*, iaman fabrikon de filmpro- duktado kun ekspozicio de pli ol 800 fotoaparatoj. Ankaŭ ekskursoj por biciklantoj estis programitaj.



Dum vesperaj programeroj eblis spekti diversajn filmojn, ĝui gitarkoncerton de Feri Floro. Li prezentis latinamerikajn ritmojn ĉefe el Kubo, sed ludis ankaŭ siajn proprajn amkantojn. Speciale por infanoj estis dediĉita la pupteatro "Drakofajro" de Christoph Frank. Okazis mezepoka kostumita balo kaj paska fajro ekstere kun bastonpano kaj kantado. Ne




mankis paska nokta di- servo. La lasta internacia vespero de la semajno es- tis dediĉita al artaj kontri- buoj de la partoprenantoj mem. Ni spektis infanajn akrobataĵojn, rakontojn, kantojn, ŝercojn, ludojn ktp. La organiza teamo preparis buntan programon kaj meritas grandan dankon pro la laboro, dank' al kiu ni ĝuis agrablan semajnon en bona harmonio. Ĉiuj estas invitataj al la venontjara 40a PSI, kiu okazos en Bavario en la urbo *Bayreuth* ekde la 25-a de marto ĝis la 1-a de aprilo 2024.

*Liba Gabalda*

## MUZIKA ANTAŬVESPERO EN LA PRAGA KLUBO

La 25-an de majo 2023 mi havis post longa tempo okazon viziti la Pragan E-Klubon. Por ne nur pasivi, mi proponis pretigi por la kunveno prezenton pri „Muzikkomponistoj - esperantistoj“ kaj sekve ankaŭ komunan kantadon kun 3 ukuleloj.

Pro tempomanko mi fine koncentriĝis nur pri tri komponistoj – [David Gaines](#) (1961-) el Usono, praganano [Štěpán Urban](#) (1913-1974) kaj [Sergej Tanejev](#) (1856-1915) el Rusio. Menciindas, ke koincide kaj Gaines, kaj Tanejev ripete vizitis nian landon kaj kunlaboris kun ĉeĥaj muzikistoj. Ĉiuj tri vere regis la lingvon kaj kontribuis al la movado.



Ĉi-loke eblas skizi nur kelkajn bazajn faktojn. David Gaines verkis en 1998 sian Simfonion n-ro 1 „Esperanto“ kun kantataj Esperanto-tekstoj (verkitaj de L.L. Zamenhof, W. Auld, P. Papazova kaj Gaines mem). La komponaĵo estis en 2000 registrita de la Moravia filharmonio en Olomouc kaj sekvajare eldonita kiel KD-o. Duafoje la komponisto vizitis Ĉeĥion en 2009, kiam en la kastelo Kroměříž okazis la mond-premiero de lia trombonkonkonĉerto.

Pri lia restado tiam zorgis esperantistoj.

Prof. Štěpán (Ŝtefo) Urban, fondinto de la gitara fako ĉe la Praga Konservatorio, esperantiĝis kun sia unua edzino [Eli Urbanová](#) en 1949 kaj krom sia literatura verkado ankaŭ muzikigis ĉ. 30 poemojn de Esperantaj poetoj. Sergej Tanejev, disĉiplo de Ĉajkovskij, esperantiĝis en 1894 kaj estis unu el la unuaj aktivaj esperantistoj entute. Li korespondis kun d-ro Zamenhof kaj muzikigis romancojn en Esperanto. Li kunlaboris kun Ĉeĥa kvarteto, en kiu membris J. Suk kaj O. Nedbal.

Mi planas hejme registri la prelegon (inkl. muzikajn specimenojn) kaj disponigi ĝin rete la 26-an de julio okaze de la Esperanto-Tago. Bv. sekvi informojn en [Esperanto.cz](#) aŭ en Facebook.

Dum la kunveno mi persone konatiĝis kun sinjoro Jiří Altior kaj ligis kunlaboron koncerne muzikajn Esperanto-tradukojn, Komuna kantado de precipe konataj vakeraĵoj, dum kiu ukulelludis kun mi ankaŭ Tomáš Břicháček kaj Josef Kalčík, fariĝis sukcesa. Tio instigis nin al la ideo koncentriĝi pri realigo de reta printebla kantaro de en nia medio ŝatataj kantoj, kun indeksoj kaj laŭeble ankaŭ kun gitaragordoj. La unua rezulto de nia laboro aperos espereble dum la ĈEA-Konferenco en Prudká.

*Pavla Dvořáková*

# Renkontiĝo en Šumperk

Sabate la 20-an de majo 2023 kolektiĝis antaŭ la stacidomo de Šumperk esperantista grupo, konsistanta el 25 plenkreskuloj, du knaboj, unu buba bebo kaj unu hundo. Kvido Janík gvidis la grupon tra tri parkoj al la fajrobrigadista stacio, kie li transdonis la vorton al fajrobrigadisto Martin Volek.



Tiu montris al esperantistoj preskaŭ la tutan konstruaĵon, kie la brigadistoj manĝas, korpe ekzercas, studas, lavas siajn teknikaĵojn kaj precipe li montris la specialajn aŭtojn.



Post la trarigardo de la stacio la partoprenantoj faris komunan foton.

La programo estis daŭrigata en vinejo **U Medvídků** (Ĉe Ursetoj) per modesta tagmanĝo (kolbasetoj kun bulko), poste ĉiu povis mendi vinon, bieron, kafon, limonadon laŭ sia gusto.



Por plibonigi la humoron ludis Srandagrupo kaj inter kantoj okazis ankaŭ tombolo lerte prezentata de Kvido.



*M. Malovec*

# PEKO - Printempa Esperanto-Kunveno

18 - 21. majo 2023

PEKO estas Printempa-Esperanto-Kunveno, sed jam de kelkaj jaroj ĝi fariĝis kvazaŭ belga kongreso. Ĉi-foje oni festis la jubilean dek-jariĝon. PEKO okazis en la urbeto *Tilff*. La aranĝon organizis "Verdaj Skoltoj" sub la gvido de Valère Doumont, nomata Lupo. La organiza teamo konsistis el dek skoltestroj kaj aliaj skoltoj inter kiuj dek ses adoleskantoj kaj ok junuloj. Estis akceptitaj tri novaj skoltoj al kiuj oni transdonis nigroverdan koltukon. Skoltoj havas kromnomojn, tiel aperis inter ni Abeloo, Bizono, Briardo, Dingo, Korsako, Magoto, Mambao, Orcino, Neĝpantero.



*Tilff* estas urbeto proksima al la urbo Lieĝo. Ĝi situas en profunda valo de la rivero *Outre* ĉirkaŭata de bela naturo kaj de arbaroj por agrablaj promenadoj. La urbeto famiĝis pro sia speciala karnavalo en kiu paradas "Poreuloj" - homoj trikolore vestitaj per longaj verdaj ĉapoj

kun sonoriloj, blankaj ĉemizoj kaj pantalonoj, kaj ĉe la piedoj pajlo ĉirkaŭas la kruojn kvazaŭ radikojn. Gigantoj akompanas la grupon. En la urbeto staras fontano kun kolono ornamita per poreuloj.

PEKO-n partoprenis ĉefe junaj homoj el Belgio, Germanio kaj Francio. Entute kvindek geesperantistoj festis la dekjariĝon. Lu Wang alvenigis sep ĉinajn gejunulojn loĝantajn en Germanio same kiel ŝi. Ili ĉeestis Esperanto-kurson por komencantoj, kiun gvidis Christine Brücker laŭ diversaj instrumetodoj.



Ni loĝis en renovigita farmbieno de la kastelo *Brusonde* el la 18-a jarcento, adaptita por diversaj kulturaj okazaĵoj. Apuda lageto kun ĉisezone florantaj irisoj ĉe la rando kaj nimfeoj en ĝi, ornamas la parkon kaj donas belan vidon al la kastelo. Apud la loĝejo en antaŭa garbejo troviĝas unika muzeo pri abeloj. Ĝi prezentas filmojn pri la vivo de abeloj, posedas riĉan kolekton de abelbredaj objektoj el diversaj epokoj kaj amason da belgaj kaj eksterlandaj abeluloj skulptitaj el trunkoj. En la muzeo estas ankaŭ instalitaj du vitraj abeluloj por ebligi spekon de la agado de la abeloj. La muzeo estis inaŭgurita en la jaro 1974.



Dum la evento okazis diversaj programeroj. Bernard Regis prelegis kaj prezentis diversajn mapojn. Skoltoj priskribis la historion de la skoltismo, parolis pri siaj agadoj, aktivadoj, distraĵoj kaj aventuroj kiujn ni povis spekti ankaŭ bilde. Ili rakontis pri diversaj grupoj, laboraj kunvenoj, semajnfinoj kaj tendumadoj. Ni eksciis multon pri skoltismo - pri la tutmonda movado, pri ĵamboreoj, totemoj, diversaj insignoj kaj simboloj. Ili konigis al ni la skoltajn leĝon kaj promeson kaj informis ankaŭ pri vojaĝkonkurso kaj muzikalo dum la IJK. La himno de la Verdaj Skoltoj estas: "La aŭto de la ĉef'..." Ili kunvenis krom en Belgio ankaŭ en Francio, Germanio, Hispanio kaj Nederlando. En la ĵaŭda vespero Ideal Gabalda organizis cirklodancadon. Ĉiuj fervore sekvis la instrukciojn kaj bone amuziĝis.



Dum la tago la partoprenantoj distriĝis per diversaj ludoj, kunkantis, provis muziki per tubetoj, konstruis simplajn aŭ pli komplikajn objektojn per lignaj bastonetoj, branĉetoj, tolaĵoj, papero kaj ŝnuretoj, faris origamion, ŝtofkolorigis ĉemizojn aŭ sakojn. Okazis ankaŭ gustumado de bieroj, kaj vespere eblis spekti filmojn aŭ ĉeesti noktan ekskurson. Por la posttagmezoj estis organizitaj ekskursoj - vizito al la urbo Lieĝo kaj kajakado sur la rivero *Outre*, kie kelkaj spertis banadon ĉe renversiĝo de kajakado. Iuj piedpromenis ĝis la

abatejo *Brialmont*. Sur la ludtereno de la bieno aperis ankaŭ alia skolta grupo.

Ni manĝis precipe vegetare, kelkaj vegane. Bongustajn pladojn kuiris por ni Ella Strug kaj Eddy Van den Bosch kun la helpo de skoltoj en la kuirejo. Ni havis okazon gustumi ankaŭ ĉinan manĝaĵon (farĉitan pastaĵon) pretigitan de ĉinaj gastoj kaj anas-ovojn, kiujn provizis Valèr. Ne mankis ankaŭ frititaj bananoj kun fandita ĉokolado, specialaĵo de Verdaj Skoltoj. Ĉi-foje ili ne estis rostitaj rekte super fajro kiel oni kutimas fari en la naturo, sed bakitaj en la forno.

Antaŭ la dimanĉa forveturo estis anoncita la premio de la "Granda ludo". La gajnintoj ricevis jubilan bele ornamitan botelon, kiun ankaŭ eblis aĉeti por subteni la skoltan movadon.



Bone funkciis la libroservo de Fel. Esperantistoj el Lieĝo eldonis dulingvan libreton pri *Tilff* en Esperanto kaj la franca lingvoj. En la lasta vespero prezentiĝis la orkestro de tubistoj kaj la skeĉo pri "Kion diras vulpo?". Poste ni ĝuis koncerton de Jonny M sekvatan de diskomuziko. Ĉiuj bone amuziĝis ĝis malfruaj horoj. Estis agrabla etoso inter junaj skoltoj. Dankon al la organizantoj.

*Liba Gabalda*

## Teamo ESPERANTO denove moviĝis por PARAPLE

Pri la publika karitata aranĝo „Kuro por Paraple“, organizata ekde 2000 ĉiumaje de la samnoma praga organizo okupiganta pri paraplegiuloj, ni informis vin jam en [Starto 2021/2](#) sur la p. 51. Ĝis nun uzis servojn de [Centrum Paraple](#) pli ol 1500 rulseĝuloj el la tuta lando. Ekde 2016 partoprenas ĝin, iniciatite kaj organizite de Vlasta Pištíková, ankaŭ membroj de la klubo [E-mental](#) kaj ceteraj esperantistoj kaj favorantoj. Krom sporta engaĝiĝo dum la evento estas kolektata mono de la startkotizoj (min. 199,- CZK) kaj donacoj, sekve uzata precipe por resanigaj kaj rekapablighaj restadoj por handikapuloj. En 2021, pro la kovid-limigoj, venis la ideo realigi la aranĝon virtuale – kaj ne nur dum unu tago, sed dum la tuta monato majo. Interesitoj povis aliĝi libervole al kategorioj ne nur kurado, sed ankaŭ piedmarŝado, biciklado kaj kurado kun hundo. Laŭ siaj tempaj kaj fizikaj ebloj ili kolektis kilometrojn helpe de speciala poŝtelefona aplikaĵo, pere de kiu oni sendis siajn rezultojn al la retejo. La celo estis fari ion por sia sano kaj samtempe helpi kaj subteni bonan aferon. Ĉi-jare estis aldonita nova kategorio Malgrandaj radoj (infanĉaretoj, rulsketiloj kaj tretsketiloj).



En 2023 aliĝis al la aranĝo 1800 unuopuloj kaj 312 teamoj. Inter ili estis 39 geesperantistoj (17 virinoj kaj 22 viroj), ne nur el Ĉeĥio, sed ankaŭ el Francio, Svedio, Hungario, Slovakio, Belgio kaj Germanio. Koran dankon al ĉiuj por la partopreno! Ili dum majo atingis sume 7.468,54 kilometrojn. La teamo ESPERANTO inter 312 teamoj el la tuta lando estis fine en la belega kaj gratulinda 6-a loko!

Niaj unuopuloj estis ankaŭ sukcesaj kaj ses el ili troviĝis en diversaj kategorioj en la unua deko de la konkuro. Nome Martin Vávra (kat. Marŝado-viroj – 582 km – la 2-a loko), Miroslava Šavelová (kat. Marŝado-virinoj – 552 km – la 4-a loko), Josef Kalčík (kat. Malgrandaj radoj-viroj – 522 km – la 4-a loko), Miroslava Černá (kat. Biciklado-virinoj – 1023 km – la 5-a loko), Jitka Tyšerová (kat. Biciklado-virinoj – 945 km – la 6-a loko) kaj Jiří Mišurec (kat. Marŝado-viroj – 334 km – la 7-a loko).

La 27-an de majo realiĝis en la parko en Prago-Malešice ankaŭ publika nevirtuala „Kuro por Paraple“, kadre de kiu oni kuris simbole je 100 metroj aŭ en la nova disciplino t.n. orientiga kuro. Dum la aranĝo kun akompana kultura programo estis solene proklamitaj la rezultoj – inter la premiitoj estis ankaŭ esperantisto Martin Vávra. La teamo ESPERANTO tiel sendube kaj rete kaj fizike helpis videbligi la internacian lingvon kaj prezenti nian komunumon kiel malferman kaj helpeman. Tio nepre aprezindas kaj instigas nin ĉiujn al plia engaĝiĝo en similaj sencohavaj publikaj projektoj.



Sume ambaŭ aranĝoj alportis dank' al ĉiuj partoprenintoj por la centro Paraple enspezon preskaŭ unu milionon da kronoj. Rimarkindas, ke dum la partopreno de la ĝenerala publiko kompare kun 2021 malkreskis, la partopreno de esperantistoj kreskis je 30%. Gravus diri, ke al la alvoko eblis aliĝi ankaŭ sen devi multe sporti aŭ uzi inteligentan poŝtelefonon. Tiel faris ankaŭ mi kun mia edzo. Tiel ni povis pagi la kotizon, grandigi la teamon kaj alporti al ĝi ĉiu almenaŭ po 5 pliaj poentoj. Do kaze de la intereso povos sekvajare aliĝi kaj subteni la bonan ideon ankaŭ vi. Ne forgesu sekvi la Kalendaron en Esperanto.cz.

*Pavla Dvořáková*


## KIEL PISIS MIA VIVO Pavel Polnický

Okaze de sia vivjubileo Pavel Polnický decidis iom bilanci kaj resumi elekton de siaj rememoroj kaj travivaĵoj precipe por siaj parencoj kaj geamikoj. La pli ol 100paĝa libreto, riĉe akompanita de unikaj fotoĵoj el la privata arkivo, estas verkita ĉeĥlingve. Multa spaco estas dediĉita al lia multflanka Esperanto-vivo kaj agado, precipe al eksterlandaj vojaĝoj, organizado de aranĝoj kaj okupigo pri infanoj.



*Kun Lydie Klegová en la ĈEA-sekretariejo en Francouzská str. en 1970*

Ni povas ekscii interesaĵojn ne nur pri nia tiama Esperanto-movado, sed ankaŭ pri cirkonstancoj de lia infanaĝo aŭ pri mirinde bunta skalo de liaj profesioj. Ne mankas diversaj amuzaj rakontetoj kaj mencioj pri la nun jam forgesataj etaj absurdaĵoj de la vivo en la „reala socialismo“.



Kaptis min ekz. priskribo de lia laborbrigado ĉe esperantistaj bienuloj en Nederlando en 1968 aŭ koincida partopreno en la aranĝo por novgeedzoj en Italio en 1972. Ni ekkonas Pavel ankaŭ kiel patron kaj edzon, kredanton, domkonstruanton, sangodonanton, motoriston, danĉemulon, hobiĝardeniston aŭ turiston. Sendube mi rekomendas la tralegon!

Interesitoj povas peti la libreton ĉe [polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz) (169 Kč + poŝtokostoj)

*Pavla Dvořáková*

## Viki-aranĝo en Ĉeĥa Radio Brno


Sabate la 15-an de aprilo 2023 je la 9-a horo kolektiĝis en Ĉeĥa Radio Brno (Beethoven-strato) sep vikipediistoj laŭ invito de radia laboristo Miloš Šenkýř. Celo de la tuttaga kunveno estis plibonigi informojn pri la radio en la ĉeĥa Vikipedio. Inter la sep vikipediistoj estis ankaŭ Marek Blahuš kaj Miroslav Malovec, kies tasko estis plibonigi informojn pri la intermilita Verda Stacio. Kaj ankoraŭ unu junulo diris, ke li estas esperantisto; li laboras en Vikipedio sub salutnomo LiMir.



La vikipediistoj unue instaliĝis en la unua etaĝo en ĉambro simila al lerneja klasĉambro. Tie ili malfermis siajn portebajn komputilojn, ricevis ĉeĥlingvan broŝuron pri la historio de Ĉeĥa Radio Brno (la 7-a paĝo nomiĝas Radio Brno kaj Esperanto) kaj trafolumis kelkajn historiajn publikaĵojn. En libro *Radio-journal* oni atentigis min pri la artikoloj koncernantaj Esperanton kaj en libro *"De mikrofono al aŭskultantoj"* mi trovis informojn pri Miroslav Hršel (1930-2008), kiu junaĝe interŝanĝis esperantlingvajn leterojn kun sia frato Zdeněk

Hršel (1928-2014) kaj poste laboris kiel muzika redaktoro en Radio Hradec Králové. En televido li estis faka ĵuriano ĉe konkurso Dek ŝtupoj al la ora medalo.

Venis aktoro Zdeněk Junák, fama el televida serio Ĝendarmaj Humoraĵoj, lian voĉon konas amantoj de krimi-serioj Big Ben kaj Patro Braun (li paroligis la ĉefrolulon) kaj li dublis ankaŭ aktorojn G. Hackman, S. Connery kaj G. Depardieu. Marek Blahuš lin intervjuis kaj fotis kaj plibonigis la vikipedian artikolon pri li.



S-ro Šenkýř montris al ni la tutan domon, verkon de grava arkitekto Ernst Wiesner (1890-1971), kiu projektis ĝin origine por Banko Union. Ĉeĥa Radio havas tie sian sidejon ekde 1950. Wiesner aŭtoris plurajn konstruaĵojn en Brno, eble la plej fama estas la krematorio. La ĉiĉeronado komenciĝis sur la tegmento, de kie estas bela panoramo de Brno. Estas tie ankaŭ du abelujoj kaj ĝardeneto, ŝirmata per drata reto kontraŭ kolomboj. Sinjoro Šenkýř atentigis nin pri kelkaj gravaj konstruaĵoj, precipe tiuj, en kiuj antaŭe estis la Radio Brno. En 1925 en la nuntempa Urba Teatro en la strato Lidická (tiam Nová), en 1929 en la Stadiono en la strato Kounicova.

De tie estis elsendataj ankaŭ esperantlingvaj programoj kaj en 1950 tie okazis tutŝtata Esperanto-kongreso kun mil partoprenantoj. Kelkajn studiojn la radio havis ankaŭ en aliaj lokoj de Brno, ekz. en Hus-komunumo en Botanická, en Vintra Stadiono kaj en Janáček-teatro (nun Mahen-teatro, ĉar por Janáček oni konstruis tute novan operejon).

De tie ni iris per bela helica ŝtuparo al malsupraj etaĝoj kaj sur ĉiu ni vidis ion interesan. Ni vidis ekzemple arkivon de surbendigitaj registraĵoj, kiuj bezonus ciferecigon, sed mankas mono, tekniko kaj homoj. Ankaŭ unu skatolon kun tajpaĵoj de radioludoj: en muzeo nun troviĝas 100 m da tiaj skatoloj, en kiuj povas esti verkoj de gravaj verkistoj, ankaŭ niaj esperantlingvaj radioludoj, sed bedaŭrinde mankas listo de la verkoj kaj homoj, kiuj tion farus. En unu izolita ĉambro oni kapablas imiti diversajn sonojn, ekz. marondojn, en alia okazas radiokonzertoj.

Ni vidis ankaŭ kelkajn redakciejojn, kie okazas intervjuoj kun gastoj, kaj en unu ni renkontiĝis denove kun Zdeněk Junák kaj Vítězslav Koudelka, kiuj en rekta elsendo gvidis konkurson pri diversaj scioj. Ili donis demandon kaj la aŭskultantoj telefonis la respondojn. Al la sama ĉambro mi kaj Marek estis invititaj je la 15-a horo kaj dum 5 minutoj rekte elsendis informojn pri Vikipedio kaj Esperanto.

Kiam ni revenis al nia klasĉambro, ni povis eklabori per komputiloj pri Vikipedio. Venis al ni ankaŭ la menciita Vítězslav Koudelka, grava funkciulo de internacia asocio por enigmoj, fama konferisto Borek Kapitančík, s-ino Slabáková kaj Pavel Boudný, eksperto pri radiotekniko. Ĉiuj estis intervjuitaj

por Vikipedio, sed nur pri Koudelka aperis artikolo.

Mi mem plibonigis la artikolon pri Verda Stacio, sed pli multe da laboro atendis min hejme. Oni nome riproĉis, ke por miaj informoj mankas kontroleblaj fontoj, precipe pri tekstoj de Verda Stacio, kiuj konserviĝis. Mi skanis la unuan paĝon de ĉiu konservita verko kaj metis ĝin en nian kluban retejon por pruvi, ke la tekstoj vere ekzistas, kaj poste mi povis en la vikipedia artikolo fari referencon al ili.

La aranĝo daŭris preskaŭ la tutan tagon, kiel tagmanĝon ni ricevis picon kaj povis ricevi teon, kafon aŭ limonadon kun kukoj. Vespere mi jam estis laca kaj foriris, dum la junuloj ankoraŭ laboris. Tamen mi ĝojas pri la nova sperto.

*Miroslav Malovec*





# Jaroslav Hašek

1883 - 1923



Ĉi-jare ni memorigas la 140-an datrevenon de naskiĝo kaj la 100-an de morto de nia humoristo kaj satiristo. Kiel knabo li lernis en gimnazio, drogejo, komerca lernejo, sed fariĝinte banka oficisto, li baldaŭ forlasis la postenon kaj preferis la vivon de bohemiano kaj vaganto. Kun siaj amikoj li trairis la centran Eŭropon ĝis Balkano, dumvoje ili faris petolaĵojn, eĉ friponaĵojn, kaj li poste ĉion priskribis en bonhumoraj rakontoj, per kiuj li perlaboris monon (ekde sia 18-a jaro). Li preskaŭ inundis ĉiujn tiamajn ĉeĥajn ĵurnalojn kaj gazetojn per satiroj. Kiel soldato li estis sendita al la rusa fronto, tie li forkuris al la rusa flanko, estis membro de ĉeĥaj legioj kaj poste de Ruĝa Armeo. Post reveno al Ĉeĥoslovakio li foriris al Lipnice na Sázavou, kiel li verkis sian ĉefverkon *La aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito*, sed mortis meze de la kvara volumo. Krom Ŝvejk li postlasis ĉirkaŭ 500 - 1000 rakontojn.

La unua rakonto de Hašek tradukita al Esperanto estis verŝajne **Pri bela sinjorino kaj urso en la valo Začaljanka** (tr. H. K. Bouška, Progreso 1931) kaj dua **Financa mizero** (tr. Stanislav Kamarýt, Ĉeĥoslovaka antologio 1935). Sed jam en la jaro 1934 eldonis SAT en Parizo dek unuajn ĉapitrojn de la romano en traduko de Jozefo Ŝtadler sub titolo **Travivaĵoj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito**.

Pluaj rakontoj aperis nur post la milito,

nome **Ekzemplo el la vivo** (tr. Josef Chvosta, Suda Stelo 1958), **Kiel mi alkudris butonon al mia pantalono** (tr. Miloš Lukáš, Nica literatura revuo), **La Amsterdama hom-negocisto** (tr. Zdeněk Hršel, Kata Gazeto 1969), **En rolo de komandanto de la urbo Bugulma** (tr. Jan Rybář laŭ Dikobraz 1977), **Rakonto pri cimoj** (tr. Miloš Lukáš, Kolora Kalejdoskopo 1977), **Fatala kunsido de la senarmiga konferenco** (tr. Jiří Karen, Paco, 1983), **Ŝvejk elĵetita el frenezulejo** (tr. O. Kníchal, Fonto 39), **Ŝvejk ĉe soldatpastro** (O. Kníchal, Hungara Vivo 1983), **La interveno de la brava soldato Ŝvejk en la mondmiliton** (tr. Josef Rumler, En la koro de Eŭropo 1983), **Inter bibliofiloj** (tr. J. Patera, Paco 1985), **Konciza enhavo de sanga romano, Stranga besto** (tr. J. Patera, Bulteno Praha 1987), **Psikiatria mistero** (tr. J. Patera, Esperantisto slovakia 1998), **La homkomercisto de Amsterdamo, Joĉjo Nový rakontas pri la fianĉiĝo de sia fratino, Supo por malriĉaj infanoj, Antaŭkristnaska vespero en orfejo, La politika kaj sociala historio de Partio de modera progreso en la limoj de leĝo kaj La unua de majo de sinjoro konsilisto Mackovík** (ĉiujn tr. J. Patera, Bulteno de EK).

En la jaro 1994 la eldonejo KAVA-PECH eldonis libron **Ne nur soldato Ŝvejk** enhavanta rakontojn verkitajn en la unua persono, tiamaniere estiĝis kvazaŭ burleska aŭtobiografio de Hašek. Esperantigis Miroslav Malovec kaj Jiří Patera. Fine de la libro aperis kelkaj diverstemaj tradukoj de aliaj tradukintoj.

Sed nur en la jaro 2004 KAVA-PECH eldonis la kompletan tradukon de **Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito** danke al tradukinto Vladimír Váňa (1932-2000) el Plzeň. La unuan volumon li preparis jam antaŭ la jaro 1983, kiam ĈEA intencis eldoni ĝin omaĝe al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Hašek, sed komunistoj tion ne permesis. La tajpaĵo poste kuŝis ĉe Vlastimil Kočvara (kiu zorgis pri la eldona agado de nia asocio) 15 jarojn, kiam ni komencis ciferecigi Esperantan literaturon. Mi proponis, ke mi enkomputiligos ankaŭ Ŝvejkon. Kiam V. Kočvara veturis tra Brno, mi atendis ĉe la trajno kaj tra la fenestro ricevis la tajpaĵon. Poste kun sinjoro Josef Mendl el Milevsko ni enkomputiligis la tradukon kaj mi poste sendis disketon al sinjoro Váňa kun ideo publikigi la tradukon en la interreto. La ideo sinjoron Váňa entuziasmigis kaj li rapide finis la tradukon de la tri aliaj volumoj. Montriĝis, ke li havis pli bonan komputilon ol mi. Mi poste sendis la verkon al Franko Luin en Svedio, kiu ĝin envicigis en sian eLibrejon (interreta biblioteko) en la jaro 2001.

Kiam pri la traduko komencis interesiĝi Petr Chrdle kun intenco eldoni ĝin libroforme, Vladimír Váňa la tradukon ankoraŭ plibonigis. Sed bedaŭrinde li mortis pli frue ol la libro eldoniĝis. Petr devis prizorgi kopirajton por la ilustraĵoj de Josef Lada kaj precipe li atingis, ke UEA akceptis la libron en sian serion Oriento-Okcidento sub numero 38. En la serion estas akceptataj nur verkoj, kiuj reprezentas la orientan aŭ la okcidentan kulturon (el la ĉeĥa ankoraŭ R.U.R. de Karel Čapek sub numero 47).

Sed per tio nia rilato al Hašek ne finiĝis. En la jaro 2011 vizitis la pragan klubon sinjoro Richard Hašek, la nepo de la verkisto, kaj samjare la asocio de tradukistoj kaj interpretistoj organizis hašekologian konferencon, en kiu reprezentis Esperanton Margit Turková kaj Jiří Patera. Kaj en la jaro 2013 estis en Lipnice nad Sázavou starigita monumento omaĝe al Jaroslav Hašek kaj Joseph Heller (kiu ankaŭ verkis gloran kontraŭmilitan romanon, La kapo XXII) kaj la okazigantoj deziris gravuri en la monumenton unu frazon el Ŝvejk en dek lingvoj, inkluzive de Esperanto: *La homa vivo, obeeme mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, estas tiel komplika, ke la nura vivo de homo estas kompare kun tio bagatelo.* En la ĉeĥa originalo estas uzitaj du diferencaj vortoj (lidský život - život člověka), kvazaŭ temus pri du diferencaj aferoj, sed en Esperanto necesas uzi la saman vorton, nur en formo adjektiva kaj substantiva (homa vivo - vivo de homo), la diferenco ne estas tiom forta. La tradukinto devis solvi multajn tiajn problemojn, kiujn ofte ne scias venki eĉ la plej prestiĝaj mondlingvoj.

Miroslav Malovec



## LANĈO DE TRI LEGINDAJ LIBROJ

La 11-an de majo okazis en urbo Olomouc signifa afero – festo de tri legindaj libroj. Lokaj esperantistoj komune kun pliaĝuloj aranĝis kunvenon en ilia bela klubejo.



Antaŭ 14-a horo la ĉeestantoj, finfine ĉirkaŭ 50 homoj, esperantistoj kaj neesperantistoj, povis foliumi, elekti kaj aĉeti libron de aro da ili. Vere grava intereso estis por tri libroj, pri kiuj estos ĉi tie la rakontado.



La oficialan programon komencis estro de E-klubo de Olomouc, sinjoro Machačík, per vortoj en Esperanto. Estas tre bone, ke la neesperantistoj aŭdu nian belsonan lingvon! (Ĉu iu ekinteresiĝu pri

Esperanto?) Poste sinjoro klubestro daŭris en la ĉeĥa, parolante pri historio de Esperanto kaj ankaŭ pri historio kaj nuntempo de la E klubo de Olomouc.

Sekvis lanĉo de la tri libroj: la unua estis SADAKO VOLAS VIVI de Karl Bruckner. La aŭtoro priskribas tragikan sorton de japana knabineto Sadako, trafita per atomradiado de hiroŝima bombo. La tradukanto de originala versio, Jan Duda (olomouca esperantisto kaj eksa violonisto de Moravia Filharmonio Olomouc kaj de Ĉeĥa Nacia Simfonia Orkestro en Prago), kortuŝita pri la sorto de la japanineto, tradukis la tekston en Esperanton. Sed la traduko devis kuŝi en lia tirkesto pro iuj problemoj kun la aŭtorrajtoj. Feliĉe post kelkaj jaroj oni sukcesis ricevi la kopirajton, kaj tiam evidentiĝis, kiel majstre Jan Duda transponis la originalan tekston. Grandan dankon kaj admiron al li!



La dua libro iĝis JARSEZONOJ KAJ FESTOTAGOJ PER OKULOJ DE BESTOJ. La aŭtorino Eva Buttová pritraktas la temon de religia vidpunkto. Kia nova ideo! La tekston trafe tradukis Pavol Petrík kaj per ĉarmaj desegnaĵoj ilustris Mirka Tomečková. Max Kaŝparů en sia recenzo taksas la libron porinfana, sed ne infaneca. Ĝi taŭgas eĉ por plenkreskuloj.



La tria libro de aŭtoro, eldonanto kaj fotografo Petr Chrdle, nomiĝas MIA VIVO KUN ESPERANTO. Interesa, leginda, parte amuza, parte serioza.



Kaj kion deziris tri sortfeinoj al la tri libroj? Kompreneble sukceson! La lasta, virino, post du viroj, finis sian paroladon per vortoj „... ĉiu el ni deziras esti sana kaj resti ĉi tie kiel eble plej longe, prefere por ĉiam. Diference ol ni, la libroj povas sukcesi! LA LIBROJ, VIVU!!!“



La parolatan vorton intertempe eniradis muziko – gitaroj, violono kaj belaj melodioj kaj kantoj de junaĝo de la partoprenantoj. Post oficiala programo prezentis sian arton pianisto kaj kantistino.

Fine de la aranĝo okazis vintosto kaj poste gustumado de bongustaĵoj, preparitaj de klubaninoj.

La aranĝo pasis en kara, agrabla etoso.

Koran dankon al la organizantoj el Olomouc!

LChal

### Rimarko de la redaktoro:

Aperis ankoraŭ du aliaj libroj, sed ties tradukintoj ne ĉeestis. **Bluaj neĝoj** de Piotr Bednarski en traduko de Ewa Grochowska priskribas travivaĵojn de la aŭtoro, kiu kiel infano travivis siberian gulagon.

La alia libro, **Ekster la limo**, apokrifoj esperantigitaj de nederlanda pastoro Gerrit Berveling, ĵus venis de la presejo. Ĝi enhavas frukristanajn tekstojn, kiuj ne estis akceptitaj por la Nova Testamento (Naskiĝo de Maria, Infanaĝo de la Savinto, Praevangelio laŭ Jakobo, Evangelio Greka laŭ Tomaso, Pseŭdo-Mateo, Descendo de Jesuo al Infero, Sep Dormantoj de Efezo).





## REMEMORE AL GEORGO RADA

Estas preskaŭ du kaj duono da jaroj de forpaso de nia fervora esperantisto Georgo Rada el Most.

Ĝis nun la oficoj ne kapablas fermi heredo-procedon (li havis neniun parencon), ne kapablas transdoni cindrounon al liaj geamikoj, esperantistoj de lia E klubo en Ústí nad Labem, ne kapablas malfermi lian loĝejon por homoj, kiuj dezirus vivi en nova hejmo...



Tamen io sukcesis. Sinjorino Jana el Duchcov, lia Esperanto-kolegino, ofere helpanta al li dum liaj lastaj ege malfacilaj tagoj, certigis kaj pagis fenestron en kolumbario en tombejo de Duchcov kaj aĉetis ŝirmkovrilon por lia ĝis nun nenia cindrouno. Alia Esperanto-amikino, Leonka el Světice, lasis krei lian medalioneton.

La rezulton, la rememoraĵon pri fervora esperantisto Georgo Rada, vi povas vidi sur la foto.

Honoron al lia memoro!

## Rememore al forpasintaj honoraj membroj de ĈEA

### Antonín Odehnal (1903-1985)



Li estis esperantisto ekde 1915. Post la unua mondmilito li fariĝis sekretario de ER en Slezská Ostrava. Poste li vivis en Městec Králové, organizis esperantajn aranĝojn, instruis en Set Lančov ktp.

### Jana Cíchová-Hrdličková (1923-2014)



Ŝi estis parolantino de esperantlingva elsendo de Ĉeĥoslovaka Radio 1963, verkis poemojn kaj multe tradukis. Ŝi kontrolis tradukon de Grafo Monte Kristo de Dumas antaŭ eldono. Ŝia patro Otomar Schäfer estis verkisto, patrino Marie Schäferová instruistino, kiu fondis la unuan ĉeĥan resanigejon. Jana edziniĝis al František Cícha, poste al Jaroslav Hrdlička.

### Jiří Laube (1923-2009)



Jiří Laube okupiĝis pri politiko, kiun li komentis, ekz. en la verketo *Ĉu kultura integriĝo de Eŭropo?* Li estas ankaŭ envicigita en la projekton *Memoro de la Nacio*, ĉar en la 50-aj jaroj li estis politike persekutata. Longe li estis sekretario de scienc-tek-nika sekcio. En la jaro 1986 li organizis en Roudnice *Terminologian Kurson* laŭ broŝuro de Jan Werner, kiu gvidis la kurson.

## Honoraj membroj jubileas

**Josef Hron** (1933), konstrufaka inĝeniero, estas membro de EK D-ro Schulhof en Pardubice, kie li laboris kiel kasisto kaj gvidis konversacian kurson.




Dum pluraj jaroj li estis prezidanto de la kontrolo grupo de ĈEA. Li aktivas ankaŭ en AEH (en 2005 li gvidis karavanon al UK en Vilno). Li estas ĉefe

konata kiel kompilanto de Granda Vortaro Esperanta-Ĉeĥa (GVEĈ) en elektronika formo en formato Excel. La vortaro enhavas pli ol 100 mil esprimojn. Krom tio ĝi ekzistas ankaŭ en reta versio. Ili troveblas ĉe:

<http://zmsoft.cz/eo-slovník-hron/>

<http://www.esperanto.cz/cs/jazykove-kurzy>

**Jan Duda** (1938) estas konata inter esperantistoj kiel violonisto, kiu jam



riĉigis multajn esperantistajn aranĝojn per sia arto, ĉi-jare li prezentas sin ankaŭ kiel tradukanto (Karl Bruckner: Sadako volas

vivi - vidu p. 56). Li faris ankaŭ multajn prelegojn, organizis solenon de 100-jariĝo de Esperanto en Olomouc (2011), preparis ekspozicion pri Esperanto en Regiona Scienca Biblioteko en Olomouc, aranĝis akcepton de la loka klubo kiel sekcion de Patrujscienca Muzeo.

**Pavel Polnický** (1943) laboris kiel sekretario de ĈEA, kiel kasisto de Loka



Kongresa Komitato dum Universala Kongreso de Esperanto en Prago 1996.

Ĝis nun li estas sekretario de KELI, prezidanto de la ĉeĥa sekcio de KELI. Li organizis

plurajn KELI-kongresojn, zorgas pri eldonado de Dia Regno presata en Poděbrady, faras korektojn, dissendas la gazeton en la tutan mondon.

Ĉi-jare li ricevis medalon de la urbo Poděbrady (vidu Starton 1/2023) kaj proprakoste eldonis libron *Jak šel můj život* (Kiel pasis mia vivo, vidu p. 51). Lia medaliono troviĝas en Memoro de la nacio, ĉar en 1968 li amatore filmis sovietiajn tankojn kaj estis enketata de sekreta polico.



**Libuše Dvořáková** (1953)

aktivas en la gvidaj funkcioj de la klubo en Svitavy, dum kelkaj jaroj ŝi estis ankaŭ komitatanino de ĈEA. Eble

ŝia ĉefa merito estas, ke en la jaro 2008 ŝi interkonsentis kun sia amikino, tiama direktorino de la urba muzeo Blanka Čuhelová, ke en neokupita spaco de Ottendorfer-domo povus estiĝi Esperanto-muzeo. La ideo kun helpo de la asocio realiĝis. La muzeo estas utiligata ne nur por ekspozicioj, sed ankaŭ por multaj aliaj aranĝoj, ekz. Marcipanaj Kristnaskoj kaj Paskoj, por renkontiĝoj de esperantistoj kun prelegoj, okazis tie ĈEA-konferenco kaj OSIEK-konferenco. Alia amikino, Radka Oblouková, kiu gvidas studentan teatron DOMA, laŭ ŝia instigo preparis jam kvar spektaklojn en Esperanto (R.U.R., El la vivo de insektoj, Ludoj kun diablo, Reĝo Lávra), kelkajn ili prezentis dum UK-oj (Rejkjaviko, Seulo, Nitra). En Svitavy estas presata kaj distribuata nia Starto, kreskas tie pluraj Esperanto-arboj, realiĝas Esperanto-tagoj por infanoj, prelegoj en lernejoj kaj aliaj aranĝoj, ĉe kiuj Libuše Dvořáková engaĝis sin, plej ofte kiel ĉefa persono.

# JUBILEANTOJ DE APRILLO, MAJO KAJ JUNIO 2023

Miroslav Boleslav, Miletín  
Jitka Drlíková, Tetín  
Jan Duda, Olomouc  
Ing. Libuše Dvořáková, Svitavy  
Libuše Dvořáková, Moravské Budějovice  
Ing. Josef Hron, Pardubice  
Hana Janíková, Bystřice pod Hostýnem  
Ing. Jan Kalný, České Budějovice  
Ing. Ladislav Kovář, Česká Třebová  
Karel Krejča, Praha  
Jiří Mitáš, Ratíškovice  
Anna Mráčková, Šumperk  
Jiřina Plášková, Velké Losiny  
Pavel Polnický, Poděbrady  
Ing. Lea Pražáková, Pardubice  
František Rakušan, Ostrava  
Jiří Studený, Brodek u Přerova  
Štefan Tkáč, Jeseník  
Vladimír Türk, Netolice  
Jiří Vyšinka, Vracov  
Mgr. Jana Brancuzská, Moravské Budějovice  
Danuše Zíková, Pelhřimov  
Anna Gybasová, Vidče

Al la jubileantoj ni deziras vivkomforton, sanon, bonhumoron en iliaj pluaj jaroj!

## TRANSDONO DE LA BIBLIOTEKO HECTOR HODLER AL LA POLA NACIA BIBLIOTEKO EN VARSOVIO

Lundon, la 29-an de majo 2023, okazis speciala ceremonio en la Biblioteka Narodowa por celebri la transdonon de la kolekto Biblioteko Hector Hodler, iniciatita lianome post lia frua forpaso en 1920. Ekde 1955 tiu kolekto trovis sian hejmon en Roterdamo, en la Centra Oficejo de UEA. Pro tio ke ni havis nek

adekvatan konservadon nek profesion bibliotekiston por prizorgi la kolekton, UEA serĉis taŭgan lokon por ĝia nova prizorgado pro la decido ne plu okupi la domon en Nederlando.

## Koncerto en la praga teatro Semafor

La 28-an de majo denove (jam trian fojon) kunveniĝis esperanto-geamikoj kun kantistino Jolana Haan Smyčková en fama, populara praga teatro Semafor.

La patro de Jolana, operkantisto, baritonulo Miroslav Smyčka, honora membro de ĈEA, forpasis antaŭ 5 jaroj, aprile 2018, do la prezentaĵo okazis krom alie ankaŭ rememore al li.

Jolana kun sia edzo Richard Haan, solkantisto de Ŝtata Operejo de Prago, kantis melodiojn de famaj operoj, muzikaloj kaj popularaj kantoj de la teatro Semafor. Prezintis sin ankaŭ iliaj du malgrandaj filoj, Richard kaj Kristian, kiuj kantis konatajn porinfanajn semaforajn kantojn.



Ĉarma surprizo estis ĉirkaŭ 25-membra infana ensemblo, perfekte kantanta, kaj eta teatra orkestro kun eminentaj muzikantoj. Ili prezentis unu muzikaĵon kun soloj de klarneto, gitaro, piano, kontrabaso kaj frapinstrumento.

La vespero entuziasmigis ĉiujn vizitantojn.  
*LChal*

## Jak platit svazu

### Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vrat. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,  
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,  
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

## Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, [polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz), tel. **723 672 335**. Předplatné uhradíte na účet u **Raiffeisenbank**, č. ú. **101 953 9617/5500**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato:** 1400,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 850,-Kč

**Juna Amiko:** 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

**Literatura Foiro:** 1450,- Kč (\*970,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (*\*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".*)

**La Ondo de Esperanto** aperas dumaniere: (1) kiel ĉiutage ĝisdatigata novaĵretejo (<https://seznoj.ru/>), kaj (2) kiel ĉiusezona almanako (kun literatura suplemento jarfine), kiu enhavas la plej gravajn tekstojn el la novaĵretejo kaj krome artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitajn speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto". La novaĵretejo ekzistas danke al la donacoj kaj abonoj al la almanako "La Ondo de Esperanto". Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanako estas legebla nur de tiuj, kiuj abonas ĝin.

**Estas tri abonkategorioj:**

- 1. Abonanto – 400 Kč**
- 2. Amiko – 800 Kč**
- 3. Patrono – 2600 Kč**

Periodikum Českého  
esperantského svazu, z.s.  
54. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

starto@esperanto.cz  
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku  
(bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:

p/a Mgr. Andrea Švubová,  
svubova@esperanto.cz

Uzávěrka příštího čísla: 15.8.2023

-

Organo de Ĉeĥa Esperanto-  
Asocio 54-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj  
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster  
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva  
numero: 15.8.2023

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;  
15.11.

## KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en  
[Eventaservo.org](http://Eventaservo.org)  
kaj [Kalendaro de Esperanto.cz](http://Kalendaro.de.Esperanto.cz)

Ĉiun duan merkredon virtualaj kunvenoj de  
E-Klubo en Brno - gastoj bonvenas!

Fizikaj renkontoj en Hybešova 65a alternas kun  
la virtualaj. <http://esperantobrna.cz>

info: [brno@esperanto.cz](mailto:brno@esperanto.cz)

## 2023

2023-07-08/16 Somera Esperanto-Studado en  
Trenčín

Info: [ses@ikso.net](mailto:ses@ikso.net)

2023-07-16/29 Unua etapo de Lančov

2023-07-30/08-11 Dua etapo de Lančov

2023-08-11 Renkonto de eksaj tendaranoj

info: [let.lancov@seznam.cz](mailto:let.lancov@seznam.cz)

2023-07-29/08-05 La 108-a Universala  
Kongreso en Torino

Info: <http://uk.esperanto.net/2023>


2023-08-5/12 Kristana kongreso en Bialystok  
info: [polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz)

2023-09-08/10 Kunveno en E-muzeo Svitavy  
Info: [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz)

2023-09-29/10-01 ĈEA-konferenco en Suda  
Moravio, nome en Prudká apud Tišnov  
Info: [komitato@esperanto.cz](mailto:komitato@esperanto.cz)



Kubaj infanoj deziras korespondi, skribu al  
Miguel Angel Gonzalez Alfonso  
[bretoniomiguel@gmail.com](mailto:bretoniomiguel@gmail.com)



La tri sortfeinoj Václav Nosek, Michal Balík kaj Leonarda Chaloupková deziras bonan sorton al la libroj *Sadako volas vivi*, *Jarsezonoj kaj festotagoj* kaj *Mia vivo kun Esperanto*



Internacia Tago de Teo en Ĉinio kun saluto el Ĉeĥio



fotis Michal Balík

Jan Duda, Pavol Petřík kaj Petr Chrdle, kiuj „kulpas“ pri la menciitaj libroj (kaj la muzikistoj)



La klubo E-mental dum semajnfina vizito en Krakovo 22-24 aprilo 2023



En la Urba Muzeo de Čáslav Petr Chrdle prelegas pri Eli Urbanová



Esperantistoj denove kuris en Prago por Paraple 27 majo 2023